# „PACO KAJ JUSTECO"

MEDEDEELINGEN VOOR DE LEDEN

3-a jaro – Nº 11 – MEDEDEELINGEN Oktobro 1944


## LA PSIKOLOGIO DE LA MURDO (4-a daŭrigo)

### Par.4.- Krimonaskaj cirkonstancoj.-

Foliante la diversajn artikolojn pri tiu temo, oni komprenas ke tio kio movas al la krimo ne same influas ĉiun individuon kaj ke la sentemo de difinita individuo varias. La stato de morala ekvilibro modifas ĝin kaj ĝi nur krizokas kiam la mortiga ideo invadis la psikon kaj atingas la maksimumon dum la krizo.

Estas evidente ke tiu ĉi paragrafo devus esti detalata – poste mi eble entreprenos tiun taskon – kaj sola ampleksus ja multajn paĝojn, sed, imitante Dron De Greeff, mi nur skizos ĉefajn dividojn kaj klasifikos ilin en du grandajn grupojn, la malpliiĝon modifanta de la socialaj kaj familiaj fortoj kaj alifarante de la adaptiĝo de la individuo al la realo.

a) En la rubriko "malpliiĝo de la socialaj kaj familiaj fortoj", ni citas: konfuzajn periodojn, militojn, revoluciojn, strikojn, batalojn, kaj krome persistan pri la morala izoliĝo, tiam bruska, de la krimonto (pro vojaĝo, fuĝo, familiforlaso, vivo en provizoraj loĝejoj, k.t.p.).

Koncerne la efikon de la senmoraliĝo de l'amasoj, ni notas ke la homo, lasita sola, tute nature emas ekstremajn kaj brutalajn solvojn kaj ke, konsekvence, malstreĉiĝo de la moralaj devigoj signifas pligraviĝon de la kriminaleco. La "patologia" aspekto de tiu lasta havas sencon nur tiamezure ke ĝi estas fenomeno neniel reduktebla al la ĉirkaŭa moraleco. Se delikto harmonias kun la ĉirkaŭaj tendencoj, ĝi inkliniĝas fariĝi "normala"; tial oni nepre ne studu la krimulon ne rilatigante lin al la ĉirkaŭaĵo, ĉar ekzemple, se ni ne nomas nenormalan patrinon kiu flegus forigas novnaskiton, en Norvegujo, kie virinoj delogitaj de grava socia movado proponas la leĝan mortigon de ĵusnaskitoj, la devia karaktero, specifanta la patologian agon, forfalas.

b) La malpliiĝo de la adaptiĝkapablo de la individuo al la realo ampleksas la korpostatajn nesufiĉojn (insuffisances constitutionnelles) nome intelektan debilecon (3) kaj precipe la anomaliojn de la temperamento, la emocian malekvilibron, kaj la akiritajn (acquises) nesufiĉojn, kiel psiĥozon en la komenco (4), diversajn toksiĝojn (5) kaj malsanon. Ebrio estas multe pli krimonaska kiam la kulpulo estis cedanta al kiam la mortiga ideo ne okupis lian menson, same, mensa malsano ĉe komencanta kaj sen grandaj simptomoj, se ĝi aliformas la personecon, igas tenure krimonaska, ĉar oni ade traktas la estontan krimulon, kvazaŭ li ne estus supersentema kaj ankoraŭ tolerus la normalan traktadon. Tial ne estas neglektinde konsideri la eblan parton de provoko fare de la socia, familia rasa medioj, kaj ankaŭ fare de la viktimo mem. Ni jam konstatis ke la estonta krimulo provas forsavi sin (ekvivalentoj, fatalismaj agoj, simptomaro de la krizo) sed oni ne ĉiam permesas tion al li.

### Par.5.- Mortigoj ne-elfaritaj.-

Antaŭ ol ilustri la teorion per tipa kazo, estas dezirinde kontaktiĝi kun ariustatoj ne tiel progresintaj, sed en kiuj malgraŭ intervenas agoj kies mortiga senco estas sendube klara kaj por ilia plenumanto kaj por la spektatoroj. La autoro de tia ne-elfarita mortigo situas ke inter la stadioj kiujn ni ekzamenis: tio montras ke se gradoj ekzistas en la fenomeno, tiuj gradoj mem estas sfaviec nuanceriĉaj. Laŭ la graveco de la mortigaj elementoj, ni rekonos:

a) hommortigan sentiluziĝon;
b) agon neniel mortigan sed kun ebla nerekta mortiga efiko;
c) preterlasan krimon;
ĉ) ne-elfaritan mortigon;

a) Jam estiĝas bedaŭro ke ŝi ne mortis kvankam li troviĝis, tute ekster la volo de la krimkandidato, en kondiĉoj kiuj antaŭvidigis la morton. Tiu mortiga seniluziiĝo, ofte ĉe heredantoj kaj flegistinoj, estas sintene nur morale kondamnebla kaj Dro De Greeff donas ekzemplon, strikte aŭtentan, kiun ni sube komplete reproduktas (la aliaj numeroj estos nur resumitaj);

Kuracisto estis vokita ĉe vilaĝanino, kiu suferis pneumonion. Ŝia stato estis senespera. Li konsideris ŝin perdita; cetere la afekcio daŭris jam ok tagojn. Li forlasis la malsanulinon, vespere, kaj petis ke oni venu tuj por serĉi la "tre fortan" botelon, kiun li preparos. Ni lasu la parolon al li:

"Mi rapide reiris por prepari la promesitan pocion (6). Mia malĝojo mildiĝis en la freŝo de la krepusko;......fore la plendo de vaportrajno skrapis la horizonton, mi longtempe aŭdis ĝin ripetiĝi.

. . . . . . .

"La botelo atendis unu horon; du horojn. La postan matenon ĝi ĉiam estis tie. Mi kredis ke la virino mortis kaj volis vidi.

"Ĉe mia eniro, tagiĝis. La edzo estis en la unua ĉambro, kubutante sur la kameno, la kapon klinitan, la pipon inter la dentoj. Ne levante la kapon (kiel li rekonis min ?), li signis ke mi eniru.

"Mi rimarkis kandelon brulantan antaŭ bildo de sanktulo sur la kameno; ŝi mortis, mi pensis. Respekte mi paŝis al la ĉambro.

o o o o o o

"Radia, la malsanulino atendis min; la cianozo (7) malaperis; la spirado estis regula; la vizaĝo ĝoje serena.

"La virino ne volis submetiĝi al nova ekzameno.

"-- Aŭskultu, ŝi konfidis al mi, estas mia tagnaŭo je S-a Antonio. Hieraŭ vespere mia edzo diris al mi: "Nu, Johana, ne eblas tiom suferi; ni faru tagnaŭon je S-a Antonio por ke li faru tion aŭ tion ĉi: saniĝi aŭ morti". Tial oni ne serĉis la botelon...

"Kiam mi repasis tra la kuirejo, la viro nun rigardis min.

"-- Nu ? li eligis.

"-- Ŝi saniĝos, mi respondis, pli feliĉa ol mi volis diri.

Lia vizaĝo ree pezis sur la pavimon.

"Ankaŭ la paroĥestro diris tion al mi, li grumblis. Tiam li aldonis kun senpova furiozo:

"-- Sacré Dieu ! Post du tagoj ŝi ree estos tie kaj superŝutos min per insultoj !"

Lavango da singultoj skuis lian pezan estaĵon; mi silente rigardis. Estis nur movo. La viro prenis karbojn el la fajro kaj rebruligis sian pipon. Poste, vidante la kandelon, kiu ankoraŭ timeme flagretis, li momenton fiksrigardis ĝin, kvazaŭ li pripensus:

"-- Senutilas malŝpari ĝin, li konkludis. Li blovestingis la kandelon. Lia blovo svingis la bildon en la aeron; ĝi refalis kiel morta folio." (8)

Ni rimarkigu: en ĉi kazo ankaŭ ekzistas latenta konflikto, laceco kaj almenaŭ la edzo jam konsideris: "kiel li fartus, kiam lia edzino estus malaperinta". La "neformulita konsento" progresis pro la grava malsano de la virino: kiam oni venigis la kuraciston la stato estis senespera kaj saniĝo ne plu probabla. Post la vizito, la edzo volus esti certa, ĉar la kuracisto ne ŝajnis konvinkita pri baldaŭa morto: tial verŝajne la tagnaŭo por akceli la aferon, ĉar S-a Antonio ne faros miraklon... La kandelo restas bruli kaj kiam la kuracisto sciigas la saniĝon, la edzo ne plu ruzas: li sakras kaj estingas la kandelon; tiu detalo rivelas por kio oni preĝis al la sanktulo.

Tiu viro certe ne murdos sian edzinon; la malsano nur montris al li eblan solvon de la laceco, kelkaj detaloj, favoraj al la malsano, estis neglektataj kaj li provis kunlaborigi sanktan Antonion. Sed estas nur nerektaĵoj, ekvivalentoj, fido al la hazardo, tamen iom helpata. La cirkonstancoj devigis la viron konsciiĝi pri la moralaj inklinoj kaj "formuli la konsenton". Tiam li bedaŭras la venigon de la kuracisto, eble ankaŭ la tagnaŭon, sed liaj precipitancoj ne plu progresas: li haltas, konsciiĝas kaj rebruligas sian pipon...

---

(1) = (6) de la antaŭa parto
(2) = (7) de la antaŭa parto
(3) dubita; sane malforta (Medicina vortaro jam citita n° 607; ankaŭ K. Kalocsay kaj G. Waringhien: Poezia Fakvortaro en "Kiel fariĝi poeto aŭ

Parnasa Gvidlibro, L.M. 1932).
(4) psiĥozo: malsano kiu koncernas la menson (Medicina Vortaro, jam citita n° 2811).
(5) toksigo: toksa = venena (sama Medicina Vortaro n° 3436).
(6) pocio: . vidu (6) ĉi-sub.
(7) cianozo: blua haŭtkoloro pro malaktiveco de la sangofluado en la kapilaraj vazoj (sama Medicina Vortaro n° 339).
(6) pocio: likva medikamento (sama Medicina Vortaro n° 2704); kuraca trinkaĵo (poezia fakvortaro jam citita sub (3).
(8) La Psychologie de l'Assassinat, loc. cit. p. 234.

(daŭrigota - Verkis por la revuo K.M.)
8888888888888888888

SKRIBTALENTOJ DE NIAJ GEMEMBROJ: - La Faktoro "Potenco" en la historio.-

(3-a daŭrigo - vidu lastan artikolon pri tiu temo en la aprila numero de '44 - La redakcio ne volis daŭrigi la artikolon dum la germana okupado de nia patrujo ĉar la verkisto skribis en ĝi verecojn kiuj oni tiam ne povis esprimi)

-----------

Jen sufiĉe da pruvoj historiaj por montri kian grandan rolon ludis la faktoro "potenco". Se, por pruvi tiajn tezojn oni ĉiam montras al longtempe pasintaj faktoj tio estas ĉar la historia perspektivo permesas pli da objektiveco kaj ankaŭ ĉar intertempe publikiĝis sufiĉe da historiaj dokumentoj kiuj montras la ĝustecon de iu tezo. Tamen por pruvi la supre donitan tezon mi volas atentigi pri fakto el la nuna tempo kiu estas tiel evidenta ke ĝi ne lasis eĉ la plej etan dubon: la ekzemplo de Finlando. Unue la Anglo-Amerikanoj komete materiale sed ege morale subtenis la luktegon de tiu malgranda popolo kontraŭ la Rusa koloso. Kontraŭe la Germanoj silentadis, silentadis. Poste la malo. La Germanoj subite ekhelpis kaj la Anglo-Amerikanoj silentadis...

Se nun ni revenas al la hodiaŭo kaj vidas la staton de l'afero ni rimarkas la jenon. La plej granda parto de la malgrandaj landoj ne gvidas sed toleras iun politikon. Kaj tiu politiko estas difinata de iuj faktoroj potencaj kaj geografiaj. Kaj tio ĝis nun daŭras ne depost kelkaj jaroj sed la daŭro por tiuj landoj malsimilas de 50 jaroj ĝis 2 jarcentoj.

Anglujo akiris en la daŭro de tiuj 2 jarcentoj grandan, vastan mondpozicion. Ĝi evidente volas gardi tion. Tio estas la nepra celo de l'angla politiko. Por tio necesas almenaŭ ke Anglujo restu arbitro pri Eŭropo. Tial ĝi ne toleras iun ajn konkurencanton en Eŭropo.

Japanujo ne nur havas similan geografian pozicion rilate al Azio kiel Anglujo rilate al Eŭropo. Sed Japanujo, kiu travivas Renesancon, kiu tre tre multe lernis pri teĥniko en Eŭropo, sentas sin la plej altnivela popolo de l'Oriento. Tion ĝi nomas: "ordigi Azion". En la estonteco Japanujo devos veni en konflikto kun Ruslando-Siberio ĉar Siberio estas en febrega ~~ĥaŭoŋa~~ evoluo. La mondo ne sciis tion pri Siberio. Germanaj aviadistoj malkovris nekonatajn centrojn de industrio.

Ameriko estas la mondpotenco kaj ankaŭ tre grava produktanto de diversaj materioj.

Sur nia kontinento ni havis ĉiam la lukton de la du fortoj Francujo-Germanujo. Francujo volas esti la plej forta sur la kontinento kaj por praviĝi tion ĝi blindiĝas sin per tuko sur kiu troviĝas la vortoj "nation prédestinée" (sorto-favorita nacio). La grandeco de Germanujo ripozas sur la kvanto de forto kiun ĝi havas kaj sur la malforto de Francujo, kiel A. Hitler mem skribas en "Mein Kampf 323-327e Auflage Zentral Verlag der N.S.D.A.P. München 1938 p. 766-767":

"La ne nur en sia homnombro sed ankaŭ en siaj plej bonaj rasaj elementoj normanta Francujo kapablas teni sian signifon en la mondo nur per neniigo de Germanujo. La Franca politiko povas fari mil flankvojojn, ie al la fino troviĝos ĉiam tiu celo kiel plenumo de lasta deziro kaj plej profunda sopiro... nur kiam oni plene komprenos tion en Germanujo, tiel ke oni ne plu lasos pereigi la vivovolon de la Germana nacio en nura pasiva sinprotekto, sed ke oni kunigos ĝin al ĝisfina aktiva intertraktado kun Francujo kaj ke oni ĵetos ĝin en lasta decida batalo kun de germana flanko plej grandaj finceloj: nur tiam oni estos kapabla finfinigi tiun eternan kaj senfruktan luktadon inter ni kaj Francujo; sed sub tiu kondiĉo ke Germanujo vidas en la pereigo de Francujo nur ilon por poste al nia popolo doni en alia direkto la eblon disvastiĝon."

(Nederlandsche Vertaling van Steven Barendts 11-25 duizend Amsterdam p.834-35)

Por pruvigi tion la Germanaj intelektuloj evidentigas la [illegible] de l'Norda Raso plej pure konservita de la Germana popolo.

Tial ni povas en plena vero diri ke la ideologioj servas por igi la popolojn pretaj al [illegible] konkero de potenco. La popoloj kredas servi al unu (la idealo) sed ne konscie ili helpas al efektivigo de la [illegible]. Dum la momento ke ideologio estas transportata ekster la landlimoj per la perforto de la armiloj ĝi ŝanĝiĝas interne, komplete kaj iĝas imperialismo.

"Ideologioj" estas esence pure spiritaj, [illegible] ne havas materiajn armilojn nek pugnojn. Ĝi konvinkas per la spirito, per la juĝo, per la menso. La plej bela historia pruvo de tio estas donata de la Franca Revolucio. Ideologie ĝi estis tute idealisma. Sed apenaŭ la unuaj batalionoj de Dumortier transportis ĝin perforte trans la limoj ke nur unu afero ankoraŭ restis: por la landoj en kiuj venis la Francoj: klopodi forĵeti la premon de la Franca potenco; kaj por la Francoj disvastigi la potencon de la Franca nacio, de la Franca politiko. Antaŭ la nuna milito pli kaj pli da homoj iĝis simpatiaj al la Naci-socialismo. Nun ankoraŭ eta grupo nur. Eble vi kontraŭdiros: estas kaj la Germanaj militistaroj donis al nia popolo tre multe da progreso rilate al nutrado, vestado, libereco k.t.p. Ni kontraŭdiras: Ĉu nun ekzistis militistaro kiu ne faris tion? Neniu. La Germanoj nun devas konfesi tiun ŝanĝon de ideologio-transportado al imperialismo. Unue ili diris ke ĉio devis plu okazi kiel kutime. Nun ili diras ke ili bezonas organizi nun tutan Eŭropon sub la gvido de Germanujo. Tial ni ripetas: estas ideologioj kiuj estas propagandataj en la landoj. Sed estas la tradicio, de cirkonstancoj geografiaj kaj psikologiaj (faktoro de l'potenco) difinita politiko kiu estas efektivigata de la diversaj politikaj landestroj.

Ni vidas ke ĉiu granda lando klopodas akiri plej eble da potenco. Kiu havas potencon klopodas havi ankoraŭ pli. La diversaj landoj havas ekonomiajn kaj aliajn interesojn. Por ordigi inter si tiujn interesojn ili ne fidas al principo de justeco sed jes al principo de forto. Per la forto akiri aŭ gardi kiel eble plej da avantaĝoj kaj cedi kiel eble malplej. Ni rajtas demandi kial la situacio estas tia. Kial la potencaj nacioj ne agas laŭ justeco sed nur laŭ grado de forto? Ni donas unue la klarigon de tiu fenomeno laŭ la Hitlera mondkoncepto. Se oni atente tralegas "Mein Kampf" ni konstatas ke laŭ la doktrinaro de tiu libro ekzistas la neorgana kaj la organa naturo. Neorgana naturo estas senkonscia vivo kiel ŝtonoj, kreskaĵoj, ligno, akvo, k.t.p. La organa naturo havas ekzemple leonojn, katojn, elefantojn, homojn, lupojn, tigrojn, k.t.p. La homo staras sur la sama rango de la bestoj. Komprenble la homo havas racion aŭ menson. Sed tiu racio aŭ menso ne servas al la homo por ordigi la mondon laŭ principoj objektivaj de justeco, morala valoro, k.t.p. sed servas nur por pli bone atingi sian celon kiel la ungegoj servas la aglon, la dentoj la tigron kaj la longega nazo la elefanton. Do la menso anstataŭas ĉe la homo la mankon de korpaj armiloj kiujn la bestoj posedas. Kaj la celo de la homo estas samkiel la celo de la bestoj: tio kio estas instinkta, interne en la homo, tio kio li estas laŭ fizikaj kaj fiziologiaj leĝoj, la sango, ĉio tio devas vivi, kreski, konkeri, submetigi, evolui ĝis plenvivo kaj plenforto. Tial estas ĉiama lukto. Tial nur la plej forta restas. La aliaj pereas. Tial nur la fortuloj havas ekzistrajton. Tiuj kiuj pereas, pruvas per tio sian malforton, do sian degeneron, sian malkapablecon, maltaŭgecon; do tiuj ankaŭ ne valoras ekzisti; ne havas ekzistrajton. "Mein Kampf" citita eldono p.317: 'Kiu volas vivi, tiu do luktu, kaj kiu ne volas lukti en tiu mondo de la eterna luktado, ne meritas la vivon".

Nia vivo kaj mondkoncepto estas tute alia. Ni kredas al la perfektigebleco de la homaro. Kaj en la fakto ke la menso de la homo taŭgas por ĉiam ordigi laŭ objektivaj principoj de justeco kaj morala valoro, ni vidas la pruvon ke ĝi ankaŭ havas tiun celon. Ĝi ne tuj venas al perfekteco sed tio daŭras kaj eĉ estas tempoj kies karaktero eble estas malantaŭeniro. Se la homaro por ordigi inter si la diversajn interesojn, ne ankoraŭ ordigas ilin laŭ la objektivaj principoj de justeco kaj de morala valoro, estas tial ke ĝi havas la nuran rimedon en la perforto. Se individuoj ne akordiĝas, ekzistas juĝistoj kaj tribunaloj kiuj devigas ilin akordiĝi. Super la individuoj ekzistas institutoj kiuj garantias tian ordigon. Sed ne ĉiam la situacio estis tia. Estis tre longa tempo dum kiu tiaj institutoj ne ekzistis kaj kiam iu individuo suferis pro maljustaĵo de alia, li devis mem doni al si justecon per la venĝo. En tiu tempo la forto estis ankaŭ la nura apogo de la individuo. Feliĉe tiu tempo estas for. Sed por la nacioj tiu tempo ne ankoraŭ estas for. Se iu maljustaĵo okazas, la reganta principo estas ankoraŭ: "venĝu, venku la alian". Ne ankoraŭ ekzistas supernaciaj institutoj por devigi la naciojn agi juste.

Eble kelkaj diros: "kiam venos tiu supernacia instituto, kelkaj potencaj nacioj klopodas havi ĝin en sia servo". Vere. Kaj ankaŭ tio estas stadio en tiu evoluo. En la komenco de la super-individuaj institutoj, la juĝejoj, la sama okazis.

Ni do povas konkludi, ĝis la tempo kiam supernacia instituto ordigos la inter-naciajn problemojn laŭ objektivaj principoj de justeco kaj morala valoro, ĝis tiam la nura apogo de la nacioj estos la forto. Tial la politiko de tiuj nacioj estos ĉiam: plivastigi sian potencon aŭ kiel eble malplej cedi. Por multaj inter ili la geografiaj cirkonstancoj difinos la celojn. Kaj la inter-naciaj bataloj estos kunpuŝiĝoj de tiuj fortoj. La ideologia flanko de la afero tiam forviŝiĝas. Kaj estas tial ke mi rajtas diri ke ĉiuj kiuj partoprenas militon kun la intenco disvastigi ideologion aŭ ordigi inter-naciajn aferojn laŭ objektivaj principoj de justeco kaj de morala valoro, trompas sin kaj estas trompataj. 1) la ideologio, afero de speco spirita, ne disvastiĝas sed male ruiniĝas per la armiloj kaj por la brutala perforto; 2) la ideologio en inter-naciaj kunpuŝiĝoj malaperas kaj cedas la lokon al la faktoro senmorala: la potenco.

(verkis speciale por la revuo: Drs F. ROOSE)

%%%%%%%%%%%%%%%%

NIA GRUPA VIVADO.- Periodo de la I-a ĝis la 3I-a de septembro 1944

Vivu Belgujo ! Vivu Esperanto !

Finfine nia komuna firmalamiko estas forĵetita el nia kara Belgujo, kaj liaj perfidaj kunlaborantoj ricevos justan punon.

La Esperanto-movado eniras novan periodon, kiu iĝos sendube glora kaj fruktodona, ĉar post la militfiniĝo, la homoj ankoraŭ unufoje vidos, kiel granda estas la barilo de la nekompreno inter la popoloj. Ĉu ili nun komprenos la necesecon de internacia lingvo ? (ni ne ankoraŭ parolas de la interna ideo de Esperanto ! )

De la I-a ĝis la 3I-a de septembro, kompleta malaktiveco regis en nia grupo "Paco kaj Justeco" kaŭze de la militcirkonstancoj. Ni tamen kelkfoje kunvenis por festi la liberigon de nia kara urbo Brugge per la Kanadiaj regimentoj. La unua laborkunveno okazis jaŭdon la 3I-an.

La sekretario Roger Isenrentant esperantlingve paroladis (3I.9.44) pri "Heraklos kaj liaj I2 Taskegoj"; tiu temo estis ŝatita de ĉiuj ĉeestantoj. Li ankaŭ disdonis la premiojn al samideano Martens Roger kaj Carlos Callewaert por la solvoj de kelkaj elrevuaj enigmoj.

Post la parolado, la prezidanto diris kelkajn vortojn koncernante la baldaŭa postmilita tempo. Li ankaŭ anoncis gravan estrarkunvenon.

Samideanino Marie-Louise Senave faris laŭ kutimo bonan kaj ekzemplan raporton pri la laborkunveno de la 3I-a de aŭgusto.

Dimanĉon la I7-an, kelkaj gemembroj ekskursis al la tereno de Ryckevelde, kaj bone sin amuzis.

ATENTU : Ni povas sciigi por sabato la I4-a de oktobro, la geedziĝon de nia kara prezidanto Fernand ROOSE je la afabla sangrupanino Henriette DE KERSGIETER. La tuta grupo ilin gratulas kaj ilindeziras geedziĝvivon feliĉan kaj prosperan.

Tiel unuiĝos du veraj esperantidealistoj, kiuj ĉiam estis por nia grupo "Paco kaj Justeco" de la plej granda signifo. Ni ĉiuj esperas ke ili ankoraŭ longtempe nin akompanos en nia kara Esperanto-movado.

(Prizorgos: Martens Roger)

Okaze de la geedziĝtago de nia prezidanto kun sangrupanino De Kersgieter H. ano de nia klubo verkis specialan baladon :

AAN DE "XANTIPPE EN SOCRATES" van "PACO KAJ JUSTECO"

-------

Ballade van twee klokken.-

Twee klokken zongen blij hun lied,
ze wisten van elkander niet.

De klepels smeedden iedre klank
der klokkenwand tot solo-zang.

En iedre klok die zong zijn eigen lied,
en hoorde 't luiden van d'andre niet.

Maar God, de opperbeiaardier
bemerkte dra hun zonn'gen tier,

Toen haald'hij uit de hooge torens
de beide klokken blij naar voren.

Ze werden beiden in één toren gehangen
nu zingen ze samen hun duo gezangen.

En zoo is snel en onverwacht
een klokkenspel tot stand gebracht.

De klokkenkamer is ruim genoeg,
er worden kleine klokjes bijgevoegd.

Welwillend nose d'opperbeiaardier
de toetsen drukken van een groot klavier.
(K.V.Z.)

---

## GANGSTER-BANDITISMO EN USONO KAJ ĜIA BATALO KONTRAŬ LA G-MEN-POLICANARO

La plej impresa fako de la gangster-industrio estis la bankrabado, kiu kreis en Usono veran gangster-epidemion. La usona junularo admiris la plej famajn bankrabistojn, la filmo montris la bankrabistojn heroaĵojn (?). Ŝajnis ke la popolo estis kontenta, ke ruzaj viroj kapablis venki la policon kaj kapti grandajn bankmonsumojn, ĉar nur estis la mono de grandaj posedantoj. Sed baldaŭ la banditoj ne nur atakis grandajn bankojn. La malgrandaj posedantoj vidis sian malfacile ŝparitan monon forrabita. Fine la rabado iĝis tiel abomeninda, la banditoj tiom permesis al si mem, ke la popolo ekkriis je helpo kontraŭ tiuj misfaroj. Nova policgrupo, la G-men policanaro kreiĝis kaj komencis ekbatali. La opinio de la usona popolo ŝanĝiĝis. For la rabistoj, vivu la policanoj. La filmoj daŭrigis siajn kriminalfilmojn sed la ĉefrolon ne plu ludas rabisto sed G-men policano-James Cagney, fama filmartisto, estas konata por siaj G-men-policanaj roloj. Nu, kiuj estis la labormetodoj de tiuj bankrabistoj ?

Unue ili dissendis siajn spionojn por esplori la monstaton de la banko, kiun ili volis priraabi. Tiuj spionoj aŭ trovis laboron en la banko - ili plejofte koruptis bankoficistojn - aŭ ĉeestis bankestrajn kunvenojn aŭ klopodis gajni novaĵojn dum festoj, kiujn donis bankestroj. Tuj ke tiu prepara laboro finiĝis kaj ke la banko troviĝis matura por esti rabita, la rabistoj ne plu longe prokrastis profiti sian okazon. Unu tagon, du, tri, kvar aŭ ankoraŭ pli da kirasitaj aŭtomobiloj - ilia nombro dependas de la grandeco de la banko - haltis antaŭ la banka enirpordego. La banditoj al la direktilo restas en la aŭtomobiloj, la aliaj eksaltas. Kelkaj inter ili gardas la straton, kaj zorgas per mitrajlpafiloj ke neniu tro alproksimiĝas; la restaĵo de la rabistoj eniras la bankon, terurigas la tie ĉeestantajn oficistojn kaj klientojn, ĉirkaŭ kiuj eksplodigas la grandan brulrezistantan monŝrankon kaj forkuras kun ĝia enhavo. Kiu kontraŭstaras estas tuj mortpafita de ili. La gangsteroj saltas en la veturilojn, jam pretaj por forveturi, prenas kelkajn homojn kiel garantiulojn, ilin metas antaŭ si sur la aŭtomobila ŝtupo kaj tiel sian forkuron kovras. Kontraŭ tiuj rimedoj oni malfacile povas reagi. Ne nur la bankojn sed ankaŭ la aŭtomobilojn, kiuj transportis la monon al la bankoj, ili atakis. Por doni ekzemplon: unu el la plej sensaciaj kaj sentiĝaj raboj estis la atako kontraŭ kirasita aŭtomobilego de la "United Trucking Corporation", en Brooklyn (New-York) en junio 1934. Tiu aŭtomobilego, vera veturanta fortikaĵo kun je mitrajlpafiloj provizita oficistaro, transportis sumon grandegan de 500.000 dolerojn. Kiam la aŭtomobilego troviĝis en kvieta strato, ĉifonĉaro baras al ĝi la vojon. La aŭtomobilego haltas, sed subite ekaperas mitrajlpafilo el tiu ĉifonĉaro, kelkaj ŝajne preterpasantoj sin montras kiel gangsteroj. "Hands-up" ili kriis kaj la surprizitaj oficistoj eĉ ne povas diri unu vorton nek pafi unu kuglon. La gangster-aŭtomobiloj aperas, oni metas la rabitan monon en tiuj-ĉi, forveturas al la Hudson rivero, transŝarĝas la rabaĵon en boato, kiu forveturas kun ĝi la 500.000 doleroj.

La G-men-policanaro ankaŭ post multaj malfacilaĵoj plimalgrandigis la nombron de bankrabadoj. Post la rabo, oni pli zorge ol kutime antaŭe kontrolis la numerojn de la ŝtelitaj bankbiletoj kaj tiamaniere oni sukcesis kapti multe da banditoj.

(daŭrigota - verkis por la revuo: Martens R)

88888888888

ATENTU : Pro manko de loko en la hodiaŭa numero la daŭrigo de la artikolo "Skizo de la antikva greka mitologio" ne povis aperi kaj estas prokrastata ĝis la novembra numero.

---

KIEL ONI ĜIN ESPRIMAS EN ESPERANTO ?

- Ofte de kaŭzo senenhava, venas efiko plej grava - (kleine oorzaken, groote gevolgen.)
- Ridas blindulo pri lamulo - (De pot verwijt de ketel dat hij zwart ziet)
- Post dormo trankvila, venas konsilo bona - (De nacht brengt raad)
- Matena horo estas plena de oro - (De morgenstond heeft goud in de mond)